

LA JUNIA VIVO

REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
WEST-GRAFTDIJK
(M.H.) NEDERLANDO
GIRONUMERO 209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15 V.FR.

F.157241

MONATA ORGANO
POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

LA SKRIBISTETO FLORENCA.

Li vizitis la kvaran unuagradan klason. Li estis gracia Florencano, dek du-jara, kun nigraj haroj kaj blanka vizaĝo. Kiel la plej aĝa filo de fervoja oficisto, kiu havis grandan familion, li vivis en malriĉeco. Lia patro tre amis lin, estis bona kaj indulgema al li. Indulgema pri ĉio, escepte kio koncernas lernadon. Koncerne tion li estis severa, ĉar la filo kiom eble plej baldaŭ devos fariĝi kapabla por oficlaboro, helpe al la familio. Kaj malgraŭ tio, ke la knabo lernadis, la patro ĉiam instigis lin al studado. La patro jam estis maljuna, kaj la troa laboro eĉ maljunigis lin antaŭtempe. Por prizorgi la familiajn postulojn, li havigis al si kopiistlaboron, krom la multa laboro de sia profesio. Tial li pasigis grandan parton de la nokto ĉe la skribotablo.

De eldonista firmo, kiu publikigis ĵurnalojn kaj librojn, li ricevis la taskon skribi la nomojn kaj adresojn de la abonintoj sur la banderolojn. Tiamaniere li gajnis po tri liroj por kvincento da klare kaj bele skribitaj banderoloj. Sed tiu laboro lacigis lin, kaj ofte li plendis al la familianoj.

„Miaj okuloj laciĝas”, li diris, „tiu nokta laboro forkonsumas min”.

Iun tagon la filo diris al li : „Paĉjo, permesu, ke mi laboru anstataŭ vi. Vi ja scias, ke mi skribas tute same kiel vi!”

Sed la patro respondis : „Ne, fileto mia, vi devas studi. Via lernado estas multe pli grava ol miaj banderoloj. Mia konscienco riproĉus min, se vi fordonus horon pro mi. Mi dankas, sed mi ne volas, ke vi eĉ plu parolu pri tio.”

La knabo sciis, ke estas vane insisti. Sed jen, kion li faris. Li sciis, ke je noktomezo la patro ĉesigas la skribadon, kaj eniras sian dormĉambron. Jam kelkfoje li aŭdis tuj post la dekdua bato de la pendolhorloĝo la bruon de movita seĝo kaj la malrapidajn paŝojn de la patro. Iun nokton la filo atendis, ĝis kiam li enlitiĝis. Tiam li senbrue vestis sin, laŭpalpe iris en la skriboĉambreton, kaj ree ekbruligis la petrolampon. Li eksidis ĉe la skribotablon, kie kuŝis amaso da blankaj banderoloj kaj listo da adresoj, kaj komencis kopii. Perfekte li imitis la patran skribmanieron. Li skribis bonvole, kontente, iom time, kaj la banderoloj amasiĝis. De tempo al tempo la knabo demetis la plumon por froti al si la manojn. Poste li rekomencis pli fervore, streĉ-orele, ridetante. Cent sesdek banderolojn li skribis : unu liron ! Tiam li haltis, remetis la plumon sur la lokon, kie li trovis ĝin, kaj senbrue reiris al la lito.

Tiun tagon la patro eksidis gajhumora ĉe la manĝotablon. Li rimarkis nenion, ĉar la adresskribadon li faris meĥanike. Li mezuris ĝin po horoj, kaj dume pensis pri aliaj aferoj. La banderolojn li kalkulas nur la morgaŭan tagon. Li altabliĝis kun gaja humoro, frapis la ŝultron de sia filo, kaj diris : „Ho, Julio, via patro estas ankoraŭ bona laboranto, estu certa! Dum du horoj, hieraŭvespere, mi skribis trionon da banderoloj pli ol kutime. Mia mano estas ankoraŭ sufiĉe rapida, kaj la okuloj ankoraŭ plenumas sian devon.”

Kaj Julio, tute kontenta, silente diris al si : „Kara paĉjo, krom la gajnmon, mi havigas al li la feliĉon, ke li kredas sin pli juna! Nu, antaŭen!”

Kuraĝa pro sia sukceso li la sekvan nokton denove ellitiĝis kaj daŭrigis la laboron. Same li faris dum kelkaj noktoj kaj lia patro nenion rimarkis. Nur iun tagon, dum la vespermanĝo, li diris : „Estas strange; kiom da petrolo ni konsumas lastatempe!”

Julio ekstremis, sed la patro nenion plu diris; kaj lia dumnokta laboro daŭris.

Bedaŭrinde, pro la ĉiunokta laboro, Joĉjo ne sufiĉe ripozis. Matene li ellitiĝis tute laca kaj vespere, kiam li skribis sian lernotaskon, li devis peni por ne fermi la okulojn. Iun vesperon — unuafoje en lia vivo — li ekdormis sur sia kajero.

„Ho!” kriis la patro, kunfrapante la manojn, „laboru, filo mia!”

Julio ekskuiĝis kaj ree eklaboris. Sed la sekvajn vesperojn okazis la samo, eĉ pli. Li dormetis sur la libroj, ellitiĝis pli malfrue ol kutime. Li studis siajn lecionojn lacmaniere. Ŝajnis, ke li malŝatas la lernadon. Lia patro observis lin, poste maltrankviliĝis, fine riproĉis

lin. Neniam li bezonis tion fari! „Julio,” li diris al li iun matenon, „vi ekŝanceliĝas. Vi ne plu estas la sama. Tion mi ne povas toleri. Vi scias, ke vi estas la espero de la tuta familio. Mi estas malkontenta pri vi; ĉu vi komprenas?”

Je tiu severa riproĉo la knabo maltrankviliĝis. Kaj — „Jes,” li diris en si mem, „estas vere, tio ne povas daŭri. La trompo devas ĉesi.”

Sed ĝuste tiun tagon, ĉe la vespermanĝo, la patro diris gaje : „Ĉu vi scias, ke dum ĉi tiu monato mi per la skribado de banderoloj gajnis tridek du lirojn pli ol dum la antaŭa monato?” Kaj de sub la tablo li prenis bombonpaketon, kiun li aĉetis por festi la eksterordinaran gajnon. La gefiloj salutis ĝin per manplaŭdado.

Tiam Julio rekuraĝiĝis kaj diris al si mem : „Ne paĉjo mia, mi ne ĉesigos la trompon; mi plimulte penos por studi dumtage, sed nokte mi laborados por vi kaj por la aliaj.”

Sed la patro aldonis : „Tridek du lirojn pli, mi estas kontenta. Tamen estas li, — kaj li montris Julion, — kiu ĉagrenas min.” Julio akceptis silente la riproĉon, kaj retenis du larmojn. Samtempe, en sia koro, li sentis profundan dolĉecon.

Kaj li plue laboregis. Sed la nova laciĝo venis al la antaŭa, kaj estis ĉiam pli malfacile ĝin elporti. La afero daŭris du monatojn. La patro riproĉadis la filon kaj rigardis lin kolere. Iun tagon li petis informojn de la instruisto, kiu diris : „Jes, li lernas, ĉar li estas inteligenta. Sed li ne estas tiel laborema, kiel antaŭe. Li ekdormetas, li oscedas. Li faras taskojn mallongajn, li skribas malbele kaj malzorge. Ho, li povus multe pli multe fari ol nun!” — Tiun vesperon la patro apartigis sian filon kaj diris al li riproĉajn vortojn, pli severe ol li iam faris. „Julio, vi vidas, ke mi laboras, ke mi eluzas miajn fortojn por la familio. Vi ne kunhelpas min. Vi ne estas bonkora por mi, nek por viaj fratoj, nek por via patrino!”

„Ho, ne! Tion ne diru paĉjo!” — ekkriis la filo ploregante, kaj li malfermis la buŝon por ĉion konfesi. Sed lia patro interrompis lin : „Vi ja scias, pri la familia situacio. Vi ja scias, ke estas necesaj ĉies bonvolo kaj sinoferoj. Mi mem — vi tion vidas — devas duobligi mian penadon. Tiun ĉi monaton mi esperis ricevi centliran gratifikon de la fervoja administracio, kaj hodiaŭmatene mi aŭdis, ke mi nenion ricevos!”

Kiam Julio aŭdis tion, li tuj retenis sian konfeson kaj decide ripetis al si mem : „Ne, paĉjo, mi diros al vi nenion. Mi gardos mian sekreton por labori por vi. La doloron, kiun mi kaŭzas al vi,

mi kompensos alimaniere. Koncerne mian lernadon, mi ĉiam studos sufiĉe por sukcesi en la ekzamenoj. Tio, kio gravas, estas, ke mi kunhelpu al vi por gajni la vivrimedojn, kaj plifaciligu vian taskon, kiu vin mortigas". Kaj li tiel daŭrigis. Denove pasis du monatoj de dumnokta laboro kaj dumtaga laceco. Multe penis la filo, multe riproĉis la patro. Sed, kio estis plej bedaŭrinda, la patro ĉiutage pli malvarmiĝis kontraŭ sia filo. Nur malofte li parolis al li, kvazaŭ li fariĝis sentaŭgulo, de kiu oni nenion povas esperi. Li eĉ evitis lian rigardon. Tion Julio ekvidis, kaj li suferis pro tio. Kiam la patro turnis al li la dorson, li kaŝe direktis al li kison, kun sento de amema kaj melanholia dolĉeco. Ĉiam pli, pro doloro kaj penado, li malgrasiĝis, kaj ĉiam pli, nepre neeviteble, li malzorgis sian studon. Li komprenis, ke tio ne povas daŭri, kaj ĉiuvespere li diris al si mem : „Ĉinokte mi ne ellitiĝos plu!" Sed je la bato de la noktomezo, ĝuste kiam li devis efektiviĝi sian decidon, li sentis konscienc-riproĉon. Ŝajnis al li, ke, se li restus en la lito, li malplenumus devon, li ŝtelus liron al sia patro kaj al sia familio. Li ellitiĝis, kaj pensis, ke iun nokton la patro vekiĝos kaj surprizos lin, aŭ ekscios hazarde pri la trompo. Tiam ĉio finiĝos tute nature. Kaj tia-maniere li daŭrigis. Sed iun tagon, dum la vespermanĝo, la patro eldiris vorton, kiu estis decida por li. Lia patrino rigardis lin, kaj pro tio, ke ŝajnis al ŝi, ke li estas pli malforta kaj pala ol kutime, ŝi diris al li : „Julio, vi estas malsana". Ŝi turnis sin al la patro, kaj diris maltrankvile : „Julio estas malsana. Rigardu, kiel pala li estas! Julio mia, kion vi sentas?"

La patro direktis al li rapidan rigardon kaj diris : „Maltrankvila konscienco kaŭzas malbonan sanon. Li ne estis tia, kiam li estis studema lernanto kaj bonkora filo."

„Sed li estas malsana!" rediris la patrino.

„Tio ne plu estas grava por mi!" respondis la patro.

Tiu frazo estis kvazaŭ tranĉilpiko en la koron de la malfeliĉa knabo.

Ho, tio ne plu estas grava por li; por lia patro, kiu iam tremis, kiam li nur aŭdis lin tuseti! La patro lin do ne plu amis! Neniu dubo, do, ke li mortis en lia koro... "Ho ne, patro mia," diris al si la knabo kun dolora koro, „nun ĝi vere devas finiĝi. Sen via amo mi ne povas vivi. Mi volas ĝin rehavi. Ĉion mi diros al vi, mi ne plu trompos vin, mi studos kiel antaŭe. Kio ajn devas okazi, ke ĝi okazu, kondiĉe, ke vi ree amu min, paĉjo, mia! Ho, ĉifoje mi vere estas firma en mia decido."

Tamen ankaŭ tiun nokton li ellitiĝis, nur pro kutimo. Kiam li estis el la lito, li volis iri por saluti tiun ĉambreton, por revidi ĝin dum kelkaj minutoj, en la noktosilento, lastfoje. La ĉambreton, kie li tiel multe kaŝe laboris, kun koro plena de kontenteco kaj dolĉeco. Poste, kiam li denove troviĝis ĉe la skribotablo, sub la lampo, kaj rigardis la blankajn banderolojn, sur kiujn li neniam plu skribos la nomojn de urboj kaj homoj, kiujn li jam preskaŭ sciis parkere, li malĝojiĝis. Kaj li prenis la plumon por komenci -sian kutiman laboron. Sed kiam li etendis la manon li tuŝis libron, kaj ĝi falis. Lia koro forte batis! Se la patro vekigis! Estas vere, ke li ne surprizus lin en malbonfaro, cetere li mem jam decidis ĉion konfesi. Tamen... aŭdi lian paŝon alproksimiĝi en la mallumo, en tiu horo, en tia silento... La patrino vekigis kaj maltrankviliĝis... Unuafoje venis al li la penso, ke la patro humiliĝis antaŭ li, se li ĉion vidus... Ĉio tio preskaŭ terurigis lin. Li streĉis sian orelon, senspire... Bruon li ne aŭdis. Li aŭskultis ĉe la seruro de la pordo malantaŭ liaj ŝultroj : nenion. En la tuta domo estis dormsilento. La patro ne aŭdis. Li trankviliĝis kaj ree ekskribis : la banderoloj amasiĝis. Li aŭdis la laŭtaktan paŝadon de policistoj en la senhoma strato, poste la bruon de veturilo, kiu ĉesis subite; post kelka tempo la bruon de vico da ŝargo-ĉaroj, kiuj malrapide traveturis. Poste sekvis profunda silento, kiun de temp' al tempo interrompis la bojadon de malproksima hundo.

Kaj li skribadis, skribadis. Dume malantaŭ li estis lia patro. Kiam li aŭdis la bruon de la libro, li ellitiĝis kaj atendis la oportunan momenton : la bruo de la veturantaj ĉaroj malhelpis, ke la knabo aŭdis la pordoknaron kaj la paŝojn, kaj nun li estis tie, kun sia blankhara kapo super la nigra kapeto de Julio. Li rigardis la plumon, kiu moviĝis sur la banderoloj : en sola momento il divenis ĉion. Li memoris ĉion, komprenis ĉion, kaj senespera pentosento, senlima amo enpenetris lian animon. — Subite Julio eligis laŭtan krion, du tremantaj manoj premis lian kapon.

„Ho paĉjo, paĉjo! Pardonu! Pardonu!” li ekkriis.

„Pardonu vi!” respondis la patro singulte, dum li kovris lian frunton per kisoj. „Mi ĉion komprenis, mi ĉion scias, estas mi, mi, kiu devas peti pardonon de vi. Venu, venu kun mi! Li alpuŝis, aŭ pli ĝuste li alportis lin al la lito de la patrino. Li metis lin inter ŝiajn brakojn kaj diris : „Kisu tiun anĝelan filon, kiu de tri monatoj ne dormas kaj laboras por mi, dum mi dolorigas lian koron : la koron de li, kiu perlaboras panon por ni!”

La patrino ĉirkaŭprenis kaj premadis lin al sia brusto; poste ŝi diris : „Iru dormi, tuj fileto mia, iru ripozi. Portu lin en la liton.”

La patro portis lin en lian ĉambron, metis lin en la liton, ĉiam karesante lin. Li aranĝis liajn kusenojn kaj litkovrilojn.

„Dankon, paĉjo”, ripetadis la filo, „dankon. Sed iru vi nun al la lito, paĉjo.”

Sed la patro sidiĝis ĉe la lito, prenis lian manon kaj diris : „Dormu, dormu, filo mia!”

Kaj Julio, kiu tute senfortiĝis, fine ekdormis, kaj li dormis multajn horojn. Unuafoje de post pluraj monatoj li ĝuis trankvilan dormon kaj ridetajn sonĝojn. Kaj kiam fine li malfermis la okulojn, la suno jam delonge brilis. Ĉe sia brusto li vidis la blankan kapon de sia patro, kiu apogis sur la rando de lia lito. Tiel la patro pasigis la nokton, kaj ankoraŭ dormadis, kun sia frunto sur la koro de la filo.

El „Koro” — Edm. DE AMICIS (adapte).

VENOS TEMPO SOPIRATA.

Laŭ nekonata aŭtoro.

- | | |
|--|---|
| 1. Venos tempo sopirata
Malaperos kruelec',
Sub la signo adorata
Ektriumfos la homec'. | 2. Malaperos la sensencoj
De milita falsa glor',
Por aliaj grandintencoj
Forte batos homa kor'. |
| 3. Per alia glorinsigno
Sin ornamos la homar',
Ĝi signifos noblan dignon
De la amo kaj bonfar'. | 4. Sur la kampoj de l' buĉado,
Kie brilis iam ŝtal',
Sin alternos la kantado
De plugist' kaj najtingal'. |

FATALA REGULO. (El. A. Puŝkin).

Ĉiam kaj ĉie fatala regulo
Regas la mondon sen ia kritik' :
Multaj kleritoj — malmultaj saĝuloj,
Svarmas konatoj — forestas amik'.

El : B. Giedra : „Violetoj”.

KIEL ART PLUGER SENPAGE PERDIS SIAJN HAROJN.*(Gaja teatraĵeto en 5 aktoj)**Personoj :*

OKKE TANMA (knabo)	S.ino TANMA (patrino de Okke)
ART PLUGER (knabo)	S.ino HALDER
HALDER (barbiro)	Kelkaj knaboj.
TOMAS (servisto de Halder)	

1-a Akto.*(La scenejo prezentas razejon. Halder iom ordigas en la ejo. S.ino Tanma, simple vestita, envenas)**Halder* : Bonan tagon, S.ino Tanma.*S.ino Tanma* : Bonan tagon.*Halder* : Per kio mi povas utili al vi?*S.ino Tanma* : Ho, S.ro Halder, la haroj de mia filo Okke estas terure longaj, kaj li ne volas iri ol vi por tondigi ilin.*Halder* : Nu, kaj kio?*S.ino Tanma* : Nun mi elpensis ruzon! Mi donos al li kvin cendojn, kaj sendos lin al vi por briko da sapo. Kiam li estas en la razejo vi kaptu lin kaj tondu liajn harojn.*Halder (ride)* : Ha, ha, ha, bonege! Nur sendu la bubon. Mi tondos lin tiel glata, kiel rano! Ha, ha, ha.*S.ino Tanma* : Mi esperas. Bonan tagon, Halder (*foriras*).*Halder* : Bonan tagon, S.ino (*kurteno*).**2-a Akto.***(La scenejo prezentas straton. Kelkaj knaboj ludas per ludglobetoj. Okke Tanma aperas. Li estas malriĉe vestita. Ĉirkaŭ la kapo pendas longaj harligoj)**Knaboj* : He, Okke! Saluton!*Okke (prenas kelkajn ludglobetojn el poŝo)* : Saluton. Mi kunludas!*Unu el la knaboj* : Bone! Ĉu ni faru trieton?*Okke* : Bone. Kiu ĵetos?*Art Pluger (unu el la knaboj, tre senzorge vestita, longaj haroj)* : He Okke, pruntu kelkajn globetojn al mi! Mi honeste redonos ilin.*Okke* : Ne, tion mi ne faras, ĉar vi certe tenos ilin!*Art* : Malnoble de vi! Se vi ne havus, mi certe pruntus al vi!*Okke (malŝate)* : Jes, se vi ne estus vi!*Art (pete al alia knabo)* : Franc, ĉu vi povas prunti al mi 3 globetojn?*Franc* : Je via kapaĉo! Mi dankas. Mi ne fidos vin, antaŭ ol vi redonos mian cendon, kiun vi pruntis de mi!*Art* : Fiavaruloj!! (*intencas foriri*).*Okke* : Haltu! Prunti al vi mi ne volas, sed vi povas meriti 3 globe-tojn.*Art (iom suspekta)* : Kion mi faru?*Okke (prenas 5 cendojn el la poŝo kaj donas ilin al Art)* : Jen kvin

cendoj. Iru al Halder kaj aĉetu por la mono sapobrikon. Diru nur, ke ĝi estas por S.ino Tanma en la Mallumstrateto, tiam li scias, kion li donu.

Art : Nenio pli? Kaj ĉu mi tiam ricevos la 3 globetojn?

Okke : Jes. (*Art foriras; la knaboj daŭrigas la ludon*). *Kurteno*.

3-a Akto.

(*En la razejo. Halder kaj Tomas*)

Art (envenas) : Bonan tagon.

Halder kaj Tomas : Saluton.

Halder (moke) : Nu, ĉu vi venas por razigi vin?

Art : Ne, mi venas por briko da sapo kvincenda. Estas por S.ino Tanma en la Mallumstrateto.

Halder (ruze ridetante) : Ha tiel! (*okulsignas al Tomas, kiu malantaŭ Art iras al la pordo kaj turnas la ŝlosilon*).

Tomas : Jen, tiu birdo estas en la kaptilo! (*Art rigardas nekomprene*).

Halder : Kaj nun ni tondos vin tiel glata, kiel rano! (*al la servisto*). Venu Tomas, helpu min iom (*ili provas sidigi Art*).

Art (time) : Sed, sed... Lasu min! (*forte kontraŭstaras*). Aŭ, aŭ!! Mi ja donis al vi monon por sapo! (*forte krias*).

S.ino Halder (aperas en la pordo) : Sed Jan, kion vi faras al tiu knabo?

Halder : Mi venkos tiun obstinan azenon! (*Art batas per brakoj kaj piedoj*). Ĉirkaŭmetu al li tukon, Tomas, kontraŭ la ŝprucado de la sango!

Art : Helpon, helpon!! Patrino, patrino! Vi estas fiuloj! Mi gratos vin! Mi rakontos al mia patrino!

Halder : Se vi disbatas la aĵojn ĉi tie, mi fortranĉos al vi la nazon kaj orelojn! Nu, Tomas, ligu la tukon al la seĝo (*Tomas faras tiel*). Jen bone, kaj nun tondu lin tiel glata, kiel holanda fromaĝo. Ne restu eĉ unu hareto. Uzu la plej grandan tondilon (*Tomas ektondas. Art iom post iom kvietiĝas*).

Art (post iom da paŭzo) : Sed, S.ro Halder, kial vi do tondas miajn harojn? Mi ja venis por briko da sapo?

Halder : Sapo, ha, ha, ha. Vi ne venis por sapo. Via patrino sendis vin pro viaj longaj haroj, kaj la sapo estis nur elpenŝaĵo de ni.

Art : Tamen mi ne foriros sen la sapo. Okke Tanma sendis min ĉi tien por sapo, kaj sen ĝi mi ne foriros!

Halder (mire) : Kion, kiu vin sendis???

Art : Okke Tanma.

Halder : Ĉu do vi ne estas Okke Tanma???

Art : Ne, mia nomo estas Art Pluger, kaj mi loĝas tuj apud li. Li nun ludas tie, ĉe la turo (*montras al la fenestro*).

(*Halder kaj Tomas laŭte ridegas. Intertempe Tomas tondas la harojn*).

Tomas (moke) : Jen, sinjoro, vi estas preta! Ĉu estas tiel laŭ via plaĉo? Aŭ ĉu vi preferas ankoraŭ pli mallonge? Vi nur ordonu!

(Li malligas la tukon kaj Art ekstaras. Li surmetas la ĉapon).

Art : Ĉu mi nun ricevos la sapon?

Halder (puŝas lin al la pordo) : For, knabo, al via patrino, kaj alportu kvin cendojn por la tondado de viaj haroj. For vi, ha, ha, ha!

Kurteno.

4-a Akto.

(Surstrate. La knaboj ludas. Art venas)

Okke : Kie estas la sapo?

Art : Bela historio. Tuj kiam mi venis en la frizejo kaj petis sapobrikon por S.ino Tanma, la barbiro kaj la servisto prenis min kaj tondis min tiel glata, kiel tiu rano! Kaj sapon ili ne volis doni al mi. *(Okke rigardas mirege)*. Jen, vidu! *(demetas la ĉapon kaj frotas kontente la stopletojn)*. Ĉu vi vidas?

Okke (furioze eksaltas) : Tio estas fi-ago de vi! Vi tondigis la harojn anstataŭ aĉeti sapon! Sed redonu la monon! Ĉu vi komprenas, tion mi ne lasos! Ĉu vi opinias, ke vi rajtas tondigi al vi la harojn por la mono de mia patrino?

Art (time malantaŭenpuŝas) : Mi ne faris. Via patrino interkonsentis kun Halder, ĉar vi ne volis iri al la barbiro, kaj nun li traktis min anstataŭ vin. Halder nur eraris!

Okke (subite komprenas kaj ekridas) : Ha, ha, ha, komika historio! Nu, prefere vi ol mi! Ha, ha, ha! Sed Halder devas redoni al mi la 5 cendojn, ĉar mia patrino ne bezonas pagi por la hartondado de aliaj knaboj! Ha, ha, ho jen, tio estas tre komika! Ha, ha, ha!

Art : Unue vi devas doni la 3 globetojn al mi! Mi meritis ilin honeste.

Okke : Kion, meritis? Vi meritis nenion! Vi iris por sapobriko, kaj anstataŭe vi revenas kun tonditaj haroj. Mi kore dankas vin!!!

Art (kolere) : Tio estas malnobla! Estas ne mia kulpo, ke mi ne havas sapon!

Okke : Unue mi volas havi la kvin cendojn! *(Prenas siajn globetojn de la tero)*. Atendu, mi mem iros al Halder, por preni ilin. Tion mi ne toleros! *(Iras)*. *Kurteno.*

5-a Akto.

(En la razejo. Okke envenas)

Okke : Bonan tagon! Halder, mi venas por la 5 cendoj de mia patrino! Ŝi ne diris al vi, ke vi tondu la harojn de Art Pluger, do ŝi ŝuldas nenion al vi!

Halder : Kiu vi estas, knabo?

Okke : Okke Tanma, mi venas por la 5 cendoj...

Halder : Ho jes, ho jes, vi pravas, knabo, via patrino ne pagos por aliaj knaboj *(li rapide iras al la pordo kaj ŝlosas ĝin)*. Nu, Tomas, tiu ĉi knabo tre pravas, kaj ni povas lin trakti laŭ sama maniero! Lia patrino havas rajton je tio!

Okke (komprenas, kaj ridete eksidas) : Stulta mi estis!

Halder : Ĉu ni ne ligu vin, knabo?

Okke : Ne necese. Fortondu ĉion, Halder, tiam ili povas kreski longtempe !

F I N O.

Rimarkigo : Por ĉi teatraĵeto oni bezonas du perukojn. Ĉar tiu de Art Pluger estas tondota, estas konsilinde aĉeti tre malkaran ekzempleron, aŭ peti malnovan ekzempleron de ŝminkisto. La perukon de Okke Tanma oni ne bezonas tondi. Kiam la knabo sidas en la razejo, la kurteno povas fermiĝi.



RICEVIAJ ESPERANTAJOJ

LA HISPANA TRAGEDIO, Jef Last, trad. de G. Degenkamp el la ned. lingvo. Formato 14 × 21 cm.; 188 paĝoj. Prezo : broŝ. guld. 1,50; bind. guld. 1.90. Eld. SAT, Parizo. Nederlandanoj mendu la libron nur ĉe N. F. L. E., Postbus 4050, Amsterdam.

Ne nur pro la aktualeco de la temo, sed precipe ankaŭ pro siaj literaturaj kvalitoj tiu ĉi libro, kies aŭtoro priskribas kaj prijuĝas sur la bazo de propraj travivaĵoj, trovos la atenton de la esperantista publiko.

FLANDRUJO VOKAS VIN. Granda, belaspekta afiŝo, por propagandi la XXI-an Kongreson de I. K. U. E., en Antverpeno, 5-10 aŭgusto 1939.

MALGRANDA LEGOLIBRO, D.ro L. L. Zamenhof. 70-paĝa libreto, enhavanta kelkajn fabelojn, tradukitaj de D.ro Zamenhof kaj kelkajn de li verkitaĵojn. Eld. „Eldonejo de Malkaraj Libroj”, Brno, Ĉeĥosl. Prezo : broŝ. 4 Kcs; bind. 6 Kcs. Oni nur ekspedas mendojn post antaŭpago.

„MOOI VELUWE”, LIBERTEMPEJO kaj ESP-ISTA RENKONTEJO, Garderscheweg E 40, Putten, Nederlando. Faldprospekton kaj reklamilojn pri la tarifoj la administrantoj volonte sendos.

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO. Aperis No 18 : „**Flugado alimonden**”, originale verkita en esperanto de Ernest Dodge; No 19 : „**Patro kaj filo**” kaj aliaj rakontoj, el la hungara lingvo trad. Ĥristo Iskrov. Prezo po 35 centoj. Mendeblij al „La Juna Vivo”.

T.A.G.E.-BIBLIOTEKO, No 1 : „**Kiel eduki niajn infanojn?**” de la konata svisa pedagogo D.ro Ad. Farrière, trad. de H. Ith. Wille. 70-paĝa, belaspekta libreto. Prezo guld. 0,80. La verketo estas mendeblij al la eldonejo Muusses en Purmerend, TAGE, Veendam, aŭ al „La Juna Vivo”.

Per ĉi verko TAGE komencis la eldonon de manuskriptoj, interesaj por la internacia edukistaro. Espereble ĝi estos la unua de longa serio. Tiucele oni petu manuskriptojn pri edukado el ĉiuj landoj, por ke ili estu tradukataj en E-ton. Oni sendu ilin al P. Korte, Schoolstraat, Veendam, Nederlando.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”.

...la leterojn de R. L. en No 9 de „L. J. V.” mi legis kun grandega intereso. Estas mirinda atesto pri la personeco de tiu bonega virino, ke post tri jaroj en malliberejo, ŝi povis tiele skribi pri la naturo, ktp. Speciale plaĉis al mi la rakonto pri la bubaloj; certe ĝi estas iom malĝojiga kaj kortuŝas en kelkaj lokoj, sed la esprimoj miaopinie tre bone taŭgas por gejunuloj. Ankaŭ la aliaj rakontetoj pri la migrantaj birdoj, la skarabo, ktp., estas tre delikataj. Mirindan bildon oni tuj vidas el la letero pri la revita vojaĝo al Korsika. Oni preskaŭ povas senti la „prahistoria silento” super kiu nur la murmuranta rivereto aŭdigas sian voĉon. Kaj la majstre pentrita bildo de la karavano de Korsikanoj! Post legado de tiu letero mi malfermis la okulojn, kaj klare antaŭ la okuloj venis la sceno. Kiel bele oni povas uzi la nurajn vortojn por vidigi tiun scenon, sed kiel malgranda estas la nombro de tiuj homoj, kiuj kapablas esprimi siajn pensojn tiamaniere! Mi estas certa, ke per la enmetado de tiaj juveloj de la skribarto en „L. J. V.”-on, vi per unu sago atingos du celojn. La gejunuloj samtempe lernos unu el la plej grandaj sekretoj de la vivo, la konduto dum malfacilaĵoj, kaj la nobla pensmaniero; kaj ankaŭ lernos kiel esprimi siajn pensojn per la ĝusta elekto de vortoj.

Leighton-Buzzard (Anglujo).

Joh. W. H.

Kiel mi povas helpi?

Geamikoj, jen estas tre bona kaj ankaŭ simpla ideo por reklami Esperanton.

Kiam vi estas en la publika legejo kaj kviete serĉas libron, metu en unu aŭ du librojn folieton pri Esperanto.

Sed — estu detektivoj! nur elektu la plej legatajn librojn, kaj tiam, kiam la legonto legos tiun libron li ankaŭ rimarkos la papeleton — kaj pensos!

Crayford (Angl.).

Douglas C. BILLS.

Noto red. : Estas bona ideo de nia juna amiko. Sammaniere ni povas skribi sur kartetojn mallongajn frazojn. Ekz. : „Per esperantismo al mondpaco”, „Rompu la murojn inter la popoloj”, „Lernu Esperanton”, ktp. Metu ilin en vagonaro, tramo, restoracio, aŭ atendejo. Zorgu, ke viaj propagandiloj bone aspektu.

Ni volas Pacon, ne nur inter nacioj, sed ankaŭ inter partioj kaj homoj; ni volas ĝin en la homaj koroj.

Francio.

E. F.

...Denove mi estas en Groet, sed nun estas vintro. La pinoj estas neĝkovritaj kaj la dunoj pensigas min pri Svisio. Mi volas, same kiel en la somero, viziti la marbordon. Tute alie aspektas la bela ĉirkaŭaĵo de Groet, preskaŭ ne rekonebla, sed tamen bela. Post longa promenado mi finfine atingas la maron, kaj jen la marbordo similas dezerton, tendo nek homo estas videbla, nur kelkajn mevojn mi vidas. Sed... mi strange rigardas la novaĵon, tion mi antaŭe neniam vidis, estas ŝipo. Kompreneble mi iras tien kaj admiras ĝin. Estas angla ŝipo. Do malgraŭ ĉio io angla, sed ne estas anglaj gejunuloj! Certe, multfoje mi ankoraŭ pripensas la aŭgustajn tagojn.

Koedijk (Ned.).

J. GEUS.

Jam antaŭ kvar jaroj, kiam mi eklernis Esperanton, naskiĝis en mi la ideo verki simplajn artikolojn, kaj dediĉi ilin al la junularo. Jam en tiu tempo vivis en mia animo granda deziro paroladi al la junuloj diverslandaj. Sed tiam mankis al mi la kapablo por esprimi miajn pensojn esperante. Tiutempe mi eĉ ankoraŭ dubis, ĉu Esperanto fariĝos tute taŭga universala lingvo.

Forpasis unu jaro, du jaroj, kaj la ardanta fajro, iun tagon naskiĝinta en mia interno por esperanto kaj la internacia junularproblemo, preskaŭ estingiĝis pro kelkaj malhelpaĵoj de la ĉiutaga vivo. Sed komence de la jaro 1934a mi povis ree okupiĝi pri Esperanto, kaj diligente daŭrigis la studadon. Baldaŭ mi korespondis kun ok landoj, abonis gazetojn, enlandajn kaj eksterlandajn. Kelkaj el tiuj gazetoj enhavis parton por la junularo kaj komencantoj, sed tiu parto ne estis tute internacia, nek interesa kaj alloga por junuloj kaj komencantoj. Nur en aŭgusto de la jaro 1934a venis en miajn manojn du ekzempleroj de la ĵus aperinta internacia gazeto por la junularo kaj komencantoj, „La Juna Vivo”. Post legado de la unua kaj dua numeroj mi konstatis, ke ĉi tiu nova gazeto trafis la ĝustan solvon por instigi la komencantojn perfektigi en la lingvo, kaj ankaŭ ĝin ŝati. Senhezite mi abonis ĝin kaj abonigis multajn geamikojn, kiuj nun sentas sin dankaj al la gazeto, ĉar ĝi kontribuis ne nur al nia esperantistiĝo, sed ankaŭ edukas nin al fervoraj Esperantistoj. Kaj ĉi lastajn la internacia lingvo plej bezonas!

Nia hispana amiko Justo Estan.

Dec. 1936.


...Mi kore petas alsendi al mi unu ekzempleron de via nova holand-lingva gazeto, kiun oni vendas per kolportado. Eble ĝi instruos min fari ion similan. Precipe la artikoloj min interesas : La tradukoj de la artikoloj ne estas bezonaj; mi petas nur mallongan skizon de la enhavoj.

Finante la leteron mi petas vin saluti ĉiujn nekonatajn gesamideanojn, grandajn kaj malgrandajn, kiuj fervore kaj ageme svarmas ĉirkaŭ vi.

Zagreb (Jugoslavujo).

Josip VELEBITH.

ENIGMOJ



Jen novspeca enigmo. La malplenaj lokoj en la suba fabelo prezentas la vortojn, kiujn oni bezonas por pleni la krucenigmon. Por iom helpi la farinto jam donis la unuan literon de ĉiu vorto, ĉiu sekva punkto prezentas literon. La ciferoj montras la lokon, kiun la vorto okupas en la desegno.

Vera fabelo.

F... (5) estis bonkora viro, el kies spirito naskiĝis, kiel f..... (2) inter la homoj, — (dank' al ĝi ĉiu homo ne plu estas izola en sia lando kiel a... (6) en sia arbaro) — E..... (3), vera o.... (4) de nova o... (9) en la mondo. Tiel malfermiĝis nova larĝa h..... (8) por la homaro, kaj speciale por la u..... (7) j..... (1), kiuj venis la antaŭan jaron en Groet, kaj kies aro pligrandiĝis, kaj formis T J. O.

Royan (Francujo).

L. CHASSERIAUD.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 1 junio 1939.

LA SOLVOJ EL No 8.

1. Mano — Pano — Rano — Vano.
2. Fumo — Lumo — Rumo — Zumo.

La premiojn gajnis : S.ro Aappo Kurikka, Petäjärvi, Finnlando; Arjen Pietjou, Leeuwarden, Nederlando.

Tre simplaj ekzercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis.

Nia mondlingvo.

Esperanto estas mondlingvo. La mondo estas granda, kaj en la mondo estas multaj lingvoj. Sed ekzistas nur unu bona mondlingvo : esperanto. Esperanto estas bela kaj bona. La esperantolecionoj plaĉas al la lernantoj. Ili skribos baldaŭ al kamaradoj en aliaj landoj. Ili aŭdos pri multaj aferoj. Ili vojaĝos al la esperantokongresoj kaj parolos tie kun kamaradoj el diversaj landoj. Ili vidos, kiom bela kaj granda estas nia tero. Ili spertos, ke ĉie loĝas bonaj homoj. Ili ne batalos kontraŭ la amikoj el aliaj landoj. Per esperanto ili komprenas, ke la milito ne estas ilia afero!

Kio estas esperanto? Kia estas la mondo? Ĉu estas multaj lingvoj? Ĉu estas multaj bonaj mondlingvoj? Kia estas esperanto? Ĉu la esperantolecionoj plaĉas al la homoj? Kion la lernantoj povas fari? Pri kio ili aŭdas? Kiuj venas al la esperantokongresoj? Kia estas nia tero? Kion spertas esperantistoj? Kion oni komprenas per esperanto?

Infano el mia lernejo rakontas.

Hieraŭ estis dimanĉo. Ni ludis matene iom en la ĝardeno. Poste mi iris kun miaj tri fratoj al la kanaleteto malantaŭ nia domo. Tie kuŝas boateto. Ni veturis al la kampoj per la boateto. Ni rigardis, ĉu jam ovoj de vaneloj estas. Sed ne estis ovoj. Ni veturis ankaŭ al la loko ĉe la digo, kie la ruboj de la vilaĝo kuŝas. Ni iris el la boateto kaj rigardis ĉie. Mia granda frato kriis subite : „Jen estas skatolo. Kaj en la skatolo estas botoj!”

La botoj estis malnovaj, kun truoj. Sed ili ne estis tre malbonaj. Ili estis tro malgrandaj por ni, domaĝe! Sed hejme estis ankoraŭ mia sesjara frateto. Mia patro diris : „La botoj taŭgas por li. Ili estas sufiĉe bonaj por la lernejo”. Nun la botoj estas sur la piedoj de mia frateto. Li estas tre ĝoja!

Kio estis hieraŭ? Kiam ni ludis? Kie nu ludis? Kien mi poste iris? Kiuj iris kun mi? Kio kuŝas en la kanaleteto? Kien ni veturis? Kion ni serĉis? Ĉu ni trovis ovojn? Kien ni iris poste? Kie kuŝas la ruboj de la vilaĝo? Kiu trovis skatolon? Kio estas en la skatolo? Kiaj estis la botoj? Ĉu ili taŭgis por ni? Kiu estis hejme? Ĉu la botoj taŭgis por li? Kie nun estas la botoj?

Vintro.

La vento estas tre malvarma. Sur la domoj, la arboj kaj la stratoj estas neĝo. La neĝo estas blanka kaj pura. Mi iras tra la stratoj al la esperanto-klubo. En la klubo estas varma forno. Apud la forno

sidas la kamaradoj. Sur la tablo estas libroj, kajeroj kaj kraĵonoj. Ni parolas kaj... lernas.

Kia estas la vento? Kie estas la neĝo? Kia estas la neĝo? Kien mi iras? Kie mi iras? Kio estas en la klubo? Kia estas la forno? Kiuj sidas apud la forno? Kio estas sur la tablo? Kie estas la kraĵonoj? Kion ni faras? Ĉu ni ankaŭ lernas?

Urba infano rakontas

Ni loĝas en Amsterdam. En nia loĝejo estas tri malgrandaj ĉambroj, unu kuirejo kaj mallonga koridoro. En la domo loĝas multaj homoj. Ili estas malriĉaj. Mia patro laboras. Li iras matene al la fabriko. En nia urbo estas multaj fabrikoj, magazenoj kaj hoteloj. Mi lernas en la popol-lernejo. Ĝi staras malproksime de nia domo, apud granda placo. Dum la monato aŭgusto ni estas liberaj. Ni ludas tiam sur la strato. Mia patrino estas ĝoja, kiam septembro komencas. Al ŝi ne plaĉas nia ludejo : la strato.

Kie ni loĝas? Kiom da ĉambroj estas en nia loĝejo? Ĉu estas ankaŭ kuirejo? Kia estas la koridoro? Kiom da homoj loĝas en nia domo? Kiaj estas la homoj? Kie laboras mia patro? Kiam li iras al la fabriko? Kio estas en nia urbo? Kie mi lernas? Kie staras la lernejo? Ĉu ĝi staras apud nia domo? Kiam ni estas liberaj? Ĉu la patrino tiam ĝojas? Kie ni ludas tiam? Kiam la patrino ĝojas?



LA JUNA VIVO VOJAĜO

La 15-taga vojaĝo al Svisio. 23 julio-6 aŭg. 43 guld.

(Vidu paĝon 133 de la marta numero)

Respondoj al kelkaj demandoj : 1. Kondiĉoj pri la pago : Kiu anoncas sin sendu samtempe 10 guldenojn. La reston oni sendu antaŭ la 10-a de julio. Se la vojaĝo pro iu kialo — ekzemple ĝenerala mobilizo — ne okazos, oni ricevas la pagitan monon. Se iu pro malsano aŭ pro familiaj cirkonstancoj ne povas kuniri, li perdas nur 10 guldenojn. Se ni trovas antstataŭanton ni resendadas ankaŭ tiujn dek guldenojn. — 2. Sabaton, la 29-an de julio, la tago kiam komenciĝas la IEL-kongreso en Bern, ni vizitos tiun urbon. Kiu deziras resti tie ĝis ĵaŭdo, la tago de nia revojaĝo, ricevas 10 guld. Krome ni repagas la elspezon por triaklasa vagonar-bileto Bern-Olten. En Olten oni povas enbusiĝi. — 3. Ankaŭ certa nombro da ne-esperantistoj povas kunvojaĝi.

Vizito al la Flandra Esperanto-Kongreso.

Dum la pentekostaj tagoj niaj flandraj samideanoj kongresos en Antverpeno. Ni organizos karavanon tien. Vojaĝsumo 3.25 guldenoj. Pluajn informojn oni petu ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”.

Por komencantoj.**Lingvo-mizero.**

La vizito de la franca prezidanto al Anglio memorigis nin pri sama okazo. En la komenco de nia jarcento la franca prezidanto Loubet vizitis Londonon. Oni entuziasme akceptis lin. Honore al li pendis kelkloke grandaj tukoj, sur kiuj en la angla lingvo staris : „Longe vivu la prezidanto”. Por komplezi al la alta gasto, oni ankaŭ tradukis tiun tekston en la francan lingvon. Almenaŭ — tion oni opiniis. Sed — efektive tiam staris sur la tuko : „Vivu la longa prezidanto”.

Se oni scias, ke Loubet estis tre malgranda, oni komprenos la amplekson de tia katastrofo!

Kiu el vi estas senpeka...

Unu matenon Jesuo sidis en loko nomita la Monto Olivarba. Subite aŭdiĝis granda bruo, kaj alkuris amaso da fariseoj kun aliaj homoj. Kun si ili tiris pekintan virinon. Ili ĉiuj kriis : „Majstro! Rigardu tiun virinon. La leĝo diras, ke oni ĵetu ŝtonojn sur ŝin, ĝis ŝi mortos. Sed vi — kion vi diras?”

Jesuo sin klinis kaj en la sablo sur la tero li skribis per sia fingro : „Kiu el vi estas senpeka, tiu ĵetu la unuan ŝtonon sur ŝin.”

Kiam ili legis tion, kaj li ripetis la vortojn al ili, ili foriris, unu post alia, kaj ili hontis. Restis tie neniu el la tuta brua amaso. Restis sole Jesuo Kristo kaj la virino, kaj ŝi kaŝis la vizaĝon en siaj manoj.

Tiam Jesuo diris : „Virino, kie estas viaj akuzintoj? Ĉu neniu vin kondamnis?”

Ŝi repondis tremante : „Neniu, Sinjoro.”

Tiam Jesuo diris : „Ankaŭ mi ne kondamnas vin. Iru, kaj ne peku plu.”

Adapte laŭ „La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo”
de Ch. Dickens.

Diferenco.

„Bonan tagon! Mi petas kolumon por mia paĉjo!” diras sepjara bubo en la vendejo.

„Bone, knabo mia, kaj kian? Kiel mia?” demandas la komercisto.

„Ne sinjoro, puran!”

Tiuj ne estis multparolaj.

La antikvaj spartanoj prefere parolis mulmulte. Ju malpli da vortoj iu uzis por esprimi siajn pensojn, des pli ili estimis lin. Kaj ili malamis ĉiun, kiu senutile uzis multajn vortojn. Iun tagon la loĝantoj de insulo suferis pro ega manko de nutraĵo. Ili sendis delegitojn al Sparta, por peti helpon kaj nutraĵon de la Konsilantaro de la Efokoj (registraranoj). La delegitoj detale priskribis la mizeron de la insulanoj, se ili sciigis al la spartanoj, ke la tuta loĝantaro mortos pro malsato, se ili ne baldaŭ ricevos helpon.

Kaj kion la spartanoj respondis? „Via parolado estis tiom longega, ke ni jam forgesis la komencon, antaŭ ol vi finis!”

Sen la petita helpo la delegitoj devis reiri hejmen.

Tiam la insulanoj sendis duan delegitaron. Ili ordonis la virojn ne malŝpari eĉ unu vorton. Ili parolu kiom eble plej mallonge. Eble ili tiam akiros helpon de la spartanoj.

La delegitoj alvenis en Sparta kun kvanto da malplenaj farunsaĵoj. Kiam ili estis en la konsilejo unu el ili montris la saĵojn, kaj diris : „La saĵoj estas malplenaj, plenigu ilin.”

Lia mallonga parolado videble pli plaĉis al la konsilantaro, ĉar ili donis la delegitojn kion ili bezonis. Tamen ĉe la adiaŭo ili ne povis ne atentigi la delegitaron, ke ilia parolado estis ankoraŭ tro longa.

„Ĉu necesis unue diri, ke la saĵoj estas malplenaj? Tion ni ja mem vidis, kaj ni plenigus ilin, ankaŭ se vi ne petus. Estonte parolu ankoraŭ pli mallonge!”

Respondu al jenaj demandoj.

Kion vi scias pri la antikvaj spartanoj? Kiajn homojn ili malŝatis? Kiuj suferis pro manko de nutraĵo? Kion faris la insulanoj? Kiel agis la delegitoj en Sparta? Ĉu ili ricevis helpon? Kial la delegitoj ne rivevis helpon? Kion la insulanoj faris poste? Ĉu ili petis la virojn fari longan paroladon? Kion la dua delegitaro kunportis? Kie oni akceptis ilin? Ĉu ili havis sukceson? Kion ili ricevis? Ĉu ilia parolado tute kontentigis la spartanojn? Kial la parolado estis tro longa?

Blankaj nigruloj.

„Ni ludu novan ludon”, diris Roberto, „la duono el ni estu blankuloj, kaj la alia duono estu nigruloj.”

„La nigruloj do devos nigrigi sin?” demandis Petro.

„Ne necesas,” rediris Roberto, „la blankuloj lavu sin!”

Li meritis la duonon.

Du knaboj interbatalis. La pli malgranda perdis la batalon kaj foriris plorante.

Maljuna sinjoro vidis tion, kaj ekkompatis la bubeton. Li iris al li, kaj diris konsole : „Nu, ne ploru knabeto, jen, kvaronguldeno por vi.”

Apenaŭ la afabla sinjoro sin turnis, kiam la alia knabo alrapidis, kaj diris : „He, Petro, honeste dividu! Tiun monon vi dankas al mia batego. Mi do meritas la duonon!”

Li estis pli juna!

Du vaguloj interparolis. „Jen, vidu, miaj piedoj ne estas tiom malpuraj kiom viaj.”

„Kompreneble, ĉar vi estas dek jarojn pli juna ol mi.”

Edinburgh (Scotlando).

Esp. Klubo.

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku ĉiujn rakontojn en la rubriko „Por komencantoj”.
2. Lernu parkere : „Blankaj nigruloj”, „Li estis pli juna”, „Diferenco”, „Li meritis la duonon”.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Lingvo-mizero” kaj de „Kiu el vi estas senpeka...”

Vojaĝo en 1939 por Esperantistoj inter Nederlando kaj Danujo.

Ankaŭ ĉijare okazos la jam tre konataj vojaĝoj por Esperantistoj inter Nederlando kaj Danujo; vojaĝoj, kies sukceso ĉiujare pligrandiĝas, verŝajne precipe ĉar la vojaĝsumo estas tre malgranda. (En 1938 pr. 80 personoj partoprenis en la vojaĝo!).

La nederlandan karavanon (ankaŭ por Belgoj kaj Francoj) de Leeuwarden al Aarhus-Risskov kaj Ry (vojaĝtempo 26/7-10/8) aranĝas S.ro G. H. M. Kat, Sportstraat 142, Leeuwarden, Nederlando, dum ke La Dana Karavano (ankaŭ por Svedoj kaj Norvegoj!) de Aarhus al Arnhem kaj Leeuwarden (vojaĝtempo 28/7-8/8) estas aranĝata de S.ro Harald Grönborg, Rosenvej 8, Risskov, Jutlando, Danujo.

Petu detalajn informojn pri vojaĝoj kaj restadejoj al la aranĝantoj!



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO.

Tervuren (7-14 aŭg.)

La internacia junularkunveno en Tervuren ĉie vekas aprobon kaj entuziasmon. La nombro de la partoprenontoj regule kreskas. Jam anoncis sin pli ol 200 gejunuloj. Bedaŭrinde multaj gvidantoj ne sendis nomojn kaj precizajn ciferojn. Espereble en la junia numero ni povos publikigi ilin.

Programo : Ni jam ricevis diversajn programerojn :

1. S.ino Jahn (bulgarino) rakontos pri moroj kaj kutimoj en Bulgario. Ŝi ankaŭ kantos kaj gitarludos kelkajn bulgarajn kantojn.
2. Prezento de la filmo pri Groet.
3. Lumbildparolado pri Bruselo kaj Ardennen.
4. Ekskurso al Bruselo.
5. Ekskurso al Ardennen.
6. Promenadoj en la arbaroj de Tervuren.
7. Plue staras sur la ĝenerala programo teatraĵetoj, dancoj, komuna kantado, promenadoj, ktp.

Pago de la kotizo : Vi scias, ke la kotizo por la tuta kunveno estas 7 guld. La duono de tiu sumo oni pagu antaŭ 15 majo. Por tiuj, kiuj anoncos sin post la 1-a de junio, la kotizo estos iom pli alta, nome 7,50 guld. Tuja anonco do estas profita por vi mem! Post la 15-a de julio ni ne plus akceptos anoncojn!

Per aŭtobuso : Ni jam luis du grandajn aŭtobusojn por la ned. infanoj. La vojaĝkostoj tien kaj reen estos 4 guld. Tre junaj infanoj tamen nur pagos 3 guld. Ankaŭ por la anglaj gejunuloj ni luos aŭtobusojn de Ostende al Tervuren.



Leuvense Pordo.



Aleo en la arbaro.

Per biciklo : Jam pr. 20 gejunuloj el Nederlando decidis bicikli al Tervuren. Por Frislando Jekke van Dijk el Rauwerd (Fr.) aranĝos biciklokaravanon.

Tria listo da partoprenontoj :

Nederlandaj knabinoj : 43. Tr. Kuiper, St. Maartensbrug; 44. Nel Tromp, Stompetoren; 45. Dina v. d. Hoff, West-Grafdijk; 46. Gurie Keesman, St. Maartensdijk; 47. Imme Groeneveld, Groet; 48. Bets Ridder, Groet; 49. Willy Selhorst, Groet; 50. Lies Veenis, Groet; 51. Lena Woest, Groet; 52. Roosje Laguna, Eemnesserweg 32B, Blaricum; 53. Tini Steyn, Koedijk; 54. Guur Barsingerhorn, Koedijk.

Nederlandaj knaboj : 55. Marten Nieuwland, Groet; 56. Gerard Bremer, Groet; 57. F. Wiedijk, Groet; 58. C. Wiedijk, Groet; 59. Jan Kat, Spoorstraat 142, Leeuwarden; 60. H. v. d. Meulen, Achter de Hoven 273, Leeuwarden; 61. Wim Schipper, Koedijk; 62. Jo Geus, Koedijk.

Gvidantoj : 63-64. Ges.roj Bant, Groet; 65. F.ino Jekke van Dijk, Rauwerd (Fr.); 66-67. Ges.roj v. d. Horst, Johan Idastraat 32, Rotterdam.

Anglaj knabinoj : 68. Lilian Davis (16-j.), New Church St.; 69. Mary Davies (18-j.), Ynysdawley Farm; 70. Gwenda Davies (15-j.); 71. May Jones (15-j.), Miskin House, Nain Rd; 72. Mary Hoskins (15-j.), Martyns Av.; 73. Menna Thomas (14-j.), Martyns Av.; 74. Barbara Bartlett (15-j.), Martyns Av.; 75. Joyce Nask (15-j.), 4 Garden City; 76. Betty Gwilym (13-j.), Brynn Celyn, Main Rd; 77. Morwen Hughes (13-j.), New Rd; 78. Beryl Williams (13-a), Delfryn, Nain Rd, ĉiuj en Seven Sisters, Neath, Britanio.

Gvidantinoj estos : 79. F.ino Rees, Derwydd, Seven Sisters, Neath; 80. F.ino Swyneth Price.

Laborkunsido : Por la laborkunsido en Tervuren ni ricevis proponon de IEL pri kunlaboro laŭ par. 13 de la statuto. Volonte ni akceptas aliajn proponojn de anoj aŭ grupoj.

Faldfolio : Petu esp. faldfolion pri Tervuren al : V. V. V., Brusschelstr. 36, Tervuren, Belgujo.

Ĝeneralaj sciigoj : Oni ankaŭ povas partopreni en la kunveno unu aŭ kelkajn tagojn.

Anoncis sin ĝis nun 16 personoj, kiuj deziras tendumi.

Kiu deziras loĝi en hotelo turnu sin al : S.ro Leenheer, Brusselschestraat 36, Tervuren, Belgujo.



Belega aleo en Tervuren.



Hispana domo.

Banado : Estas du banejoj, kie niaj gejunuloj rajtas bani je rabatita prezo.

Dormejo : De la komunumestraro de Tervuren ni ricevos la lernejĉambrojn por dormi. Granda konversacia salono estos je nia dispono.

Kampteren estas en la tuja proksimeco de Tervuren.

Radio-disaŭdigoj : La prizorganto de la junularhoreto en la radio N. I. R., Belgujo, promesis rakonti pri T. J. O. Oni ankaŭ intervjuos S. ron Rainson antaŭ la radio pri la kunveno en Tervuren.

Ankaŭ la irlanda radiostacio Dublin disaŭdigos informojn pri T. J. O.

Prezoj hoteloj : Unupersonaj ĉambroj 25-30 b. fr.; dupersonaj ĉambroj 20-40 b. fr.



La Preĝejo.



Parko.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

GEESPERANTISTOJ ! La konataj okazintaĵoj de la lasta tempo kaŭzis, ke nia movado perdis en kelkaj landoj kaj regionoj amason da bonaj, fervoraj kaj agemaj adeptoj kaj laborantoj por la ideo de internacia lingvo. Tiun ĉi pli ol dolorigan fakton ni bedaŭrinde ne povas ŝanĝi, ĉar ĝi superas niajn fortojn kaj troviĝas ekster nia povo. Tamen, ĝuste tial necese, ke ni ĉiuj ekagu ankoraŭ pli intense, energie, ofere kaj unuece en tiuj landoj, kie ni havas plenan aŭ almenaŭ partan agadliberecon. Tion ĉi postulas de ni ne nur la interesoj de la Esperantismo, sed ankaŭ la kulturo kaj progreso de la tuta homara socio, al kiu ni deziras helpi pere de la internacia lingvo. Ni ĉiuj havas unu tre fortan deziron kaj unu grandan celon : **LA PROGRESO KAJ FINAN VENKON DE ESPERANTO !**

Subtenu viajn Esperantistajn organizaĵojn, viajn klubojn kaj societojn, viajn landajn kaj fakajn asociojn. Aparte subtenu la plej grandan kaj plej fortan, vian kaj nian **INTERNACIAN ESPERANTO-LIGON.**

Eble vi ne povos rimarki tujan rezulton de via subteno, sed estu certaj, ke via laboro pli aŭ malpli frue donos bonajn fruktojn, ĉar post la malluma nokto deyas sekvi ankaŭ hela tago.

Optimisme kaj kuraĝe antaŭen ! **UNUECO ESTAS FORTO !**

komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Ĝiro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Ĝiro 310334.

Por Anglujo : J. W. Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard, Beds.

Red. „La Peranto” kaj „De Esperantist” : Meent 35, Leerdam, Ned.

Filmo : Entute ni prezentis la filmon en Ned. 25 foje. Pri Anglio ni ne havas precizajn ciferojn, tamen ankaŭ tie oni jam multfoje montris ĝin. Espereble baldaŭ en ĉiuj landoj oni havos sian propran filmon. Ĝi vere estas belega propagandilo.

Glumarkoj : Ni farigis 50.000 glumarkojn kaj jam vendis pli ol 40.000. Bonega rezultato en kelkaj monatoj. Ĉiu T.J.O.-ano daŭrigu la propagandon per nia glumarko!

Poŝtkarto : Ni eldonis poŝtkarton kun desegno de Jekke van Dijk. 10 ekz. por 10 cendoj; 100 ekz. por 80 cendoj.

PER ESPERANTO AL PACO !



Desegno de la poŝtkarto.
(La koloroj estas verda kaj flava)

„La Peranto”-n ni denove sendis senpage al 400 perantoj. Ĉiu, kiu interesiĝas pri ĉi tiu revuo povas akiri ĝin po 5 cendoj ĉe la red.

„De Esperantist” : La nederlanda kolportad-gazeto fariĝis granda sukceso. Ni vendis 3.000 ekz. kaj decidis regule eldoni ĝin. El diversaj landoj oni jam petis informojn, kaj ni esperas, ke baldaŭ en aliaj lingvoj oni eldonos similajn gazetojn. La celo estas instrui al la ne-esperantistoj la Zamenhofan idealon.

Donacoj : S.ro H. en Leighton-Buzzard (Angl.) : 1,50 gld.; S.ro v. Vl. en Rotterdam (Ned.); guld. 0,30; S.ro D. Bosma, Berlikum (Ned.): guld. 1,00; S.ro B. en Lausanne (Svis.): guld. 0,30.

Kunvenoj en Junulardomoj. En nia estrarkunveno ni decidis aranĝi semajnfinojn en junulardomoj por T. J. O.-anoj. Baldaŭ sekvos vastaj sciigoj.

Atentu ankaŭ la „Norda Stelo”-kunveno en W. Grafddijk, la 14-an de majo. Vidu anoncetojn.



KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo : Urĝe bezonas landajn Skolt-gazetojn, Esp-aĵojn, el ĉ. l. por propagandi inter skoltoj, Pastro E. N. Thomas, 18 Tithe Barn Rd, Stafford.

Bulgarujo : S.ro Nikola Kaparazev, Zlataritza (Elensko) deziras korespondi kun F.inoj.

Francujo : F.ino Debrabant Gilberte, 18 j., 75 Rue du Mary, Somain (Nord), dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj en ĉiuj landoj.

Francujo : F.ino Ringeval Jeanne, 18-jara, kaj ŝia amikinino, 16-j., dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj en ĉ. l. Rue du Maraiscaux, Somain (Nord).

Francujo : S.ino Wattelle, 6, rue Vieille Eglise, Vred par Marchiennes (N.), dez. kor. kun F.inoj aŭ S.inoj el ĉiuj landoj, ĉefe el Anglujo.

Nederlando : La malsanul-kurso en Sanatorio Juliana-Oord, petas ĉiun en la tuta mondo pri esperantaĵoj por studi kaj legi. Sendu al : Cor Salemink, Sanatorio Juliana-Oord, Laren (N.H.).

Nederlando : Komencantino (17-j.), dez. kor. per let. aŭ il. poŝtk. kun samaĝaj gekomencantoj. Skribu al : S.ro J. M. Ranzijn, 't Zand (N.H.) Resp. certa.

Nederlando : S.ro G. Middag, Overheicop, Schoonrewoerd (bij Leerdam), deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo certa.

Nederlando : 17-jara F.ino dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al : Hanny Damiaans, Hereweg A 45, Post Groet (N.H.).

Nederlando : Tiu, kiu volas korespondi pri abeloj, skribu al : J. D. Krispijn, Wognumerstr. 43, Nieuwendam.

Nederlando : 13-jara knabino dez. kor. per il. poŝtk. kaj let. kun eksterl. geamikoj. Adr.: Nelly Igesz, Sch. Hondsbosselaan J 88, Heiloo.

Skotlando : La Esp. Klubo, 61, St. Stephen Str., Edinburgh, serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo.

Bulgarujo : Jak Alkalaj, ul. Ekz. Josif I, Sofia, 15-jara knabo deziras interŝanĝi pm. kun alinacioj. Ĉiam respondos.

Francujo : Studentoj, 17-jaraj junuloj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Gouirau Lazare, Ecole supérieure de garçons, Aix-en-Provence.

Nederlando : Juna geedzoparo, laktaĵlaboristo, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. H. Bloeming, Middelie (N. H.).

Anglujo : Altlernejaj knaboj (16-18 jaraj), dez. kor. kun gejunuloj de ĉ. l. S.ro H. Bell, 25, St. Michaels Park, Bristol 2.

Polujo : S.ro Kosieniak Lech, Bydgoszcz, Dworzec Kolejowy m. 14, dez. dez. kor., interŝ poŝtm. kaj il. poŝtk. kun la tuta mondo. Resp. certa.

Usono : F.ino Alice H. Lapidge, 103-15, 121 St., Richmond Hill, N. Y., serĉas koresp. por siaj 30 gelernantoj, 12-15 jaraj.

ANONCETOJ (30 c. ĉiu linio).

POR DISTRA HORO, la plej taŭgaj libroj en Esperanto estas la „**Epoko**” libroj, eldonitaj de E.P.C. en Anglujo. La libroj enhavas interesajn, malenuigajn romanojn. Ĉiu libro enhavas 192 paĝojn, laŭ formato $7 \times 4,5$ coloj. Ĝis nun aperis : 1. **Murdo en la orienta ekspreso** (Ag. Christie, el la angla lingvo trad. Etulo); 2. **La knaboj de Paŭlo-strato** (F. Molnar, el la hungara lingvo trad. L. Spierer); 3. **La princo kaj Betty** (P. G. Woodhouse, el la angla lingvo trad. G. Badash); 4. **La tempo-maŝino** (H. G. Wells, el la angla lingvo trad. E. W. Amos); 5. **Princino de Marso** (E. R. Burroughs, el la usona originalo trad. K. R. C. Sturmer); 6. **Colomba** (Prosper Mérimée, el la franca lingvo trad. Prof. J. Beau). Prezo de ĉiu libro guld. 0,75. La ses libroj kune por guld. 4.00. Oni povas mendi la librojn al „La Juna Vivo”.

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a. Nieveld, Amsterdam.

PROFITU LA MALALTAJN PREZOJN. Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo”, '34/'35 : guld. 0,55; '35/'36 kaj '36/'37 : po guld. 0,45 (plus afranko). Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz., la prezoj estas nur guld. 0,45 kaj guld. 0,35 (plus afranko).

ESPERANTO-SEMAJNO SUR „HERZBERG”, ASP. AARGAU, SVISLANDO, de 5 ĝis 12 aŭgusto '39. Plena pensio en la popolaltlenerjo 26-35 sv. fr.; kotizo 10 sv. fr. Loĝado en la apuda junulargastejo aŭ en propra tendo estas ebla. Petu informojn de W. Kobelt, Landstr., St. Margreth, Kt. G, Svislando.

BEKNOPT ESPERANTO-WOORDENBOEK, A. G. J. v. Straaten. Ampleksa, tölbindita libro, Esp.-Ned.; Ned.-Esp. Klara preso. Prezo nur guld. 2,25. Mendebla al „La Juna Vivo”.

T. J. O.-PAKETO : 5 kovertoj, 5 leterfolioj, 5 poŝtkartoj, 2 il. kartoj, 25 glumarkoj. Prezo nur 25 cendoj (2 respondkuponoj). Adreso Fl. Meydam, Lingest. 11, Leerdam (Ned.).

POR GRUPVESPEROJ : S.ino Jahn (bulgarino) pretas paroli pri moroj kaj kutimoj en Bulgario. Ŝi ankaŭ pretas paroli ĉe la filmo pri Groet. La paroladojn ŝi faras senpage, oni nur bezonas pagi la vojaĝkostojn. Ŝia adreso estas : Jan Luikenstr. 14, Gouda.

„LA NORDA STELO”-KUNVENO. La 14-an de majo ni festos la 5-jaran ekzistadon de „La Juna Vivo” en „La Norda Stelo”-kunveno en West-Graftdijk. Job Kars (red. „La Peranto” kaj „De Esperantist”) parolos pri 5-jara internacia junularlaboro. „La Kampfloroj” prizorgos la posttagmezan programon. Venu multnombre. Petu informojn de la sekretario de „La Norda Stelo”, S.ro J. Mandemaker, Asterst. 3, Alkmaar.